



LA JUNNA VIVO

Monata gazeto de "TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO".

Redaktejo: S-ino E. Burgler, Amsterdam-W. Overtoom 435/II.

Nro de ĝirkonto por Nederlando: 537168.
Jarabono 3 ned. guld. au egalvaloro.

La prezidanto, la sekretarioj kaj
la ~~komitato~~ en ĝenerala desiras al
vi ĉiuj prosperan vojaĝon kaj
sufiĉe da entuziasmo kaj mono por
nin gaje revidi dum la IJK.

La redaktorino pardonpetas

pro la malfrua apero de ĉi duobla numero. Pro transloĝiĝo el
Geleen al Amsterdamo W. Overtoom 435/II. Ŝiaj havaĵoj estis dum
kelkaj semajnoj enpakitaj. La nuna loĝejo en Amsterdamo estas
multe malpli granda, ol la antaŭa estis, do diversaj aferoj, ĉe-
fe paperaĵoj kaj aliaj dokumentoj ne estas elpakeblaj pro manko
de loko.

Tial la malfruigo.

Ŝi klopodos la ceterajn nrojn aperigi ĝustatempe.

Sed ankaŭ vi montru vian vervon kaj sendu grandamase
artikolojn, interesajn sciigojn.

GEJUNULOJ EN TUTMONDO!

Ĉu vi volas vojaĝi? Ĉu vi volas vojaĝi bonfarte kaj
ŝparece? Vi ne kredas al tia ebleco? Ĝi ekzistas! Sed vi ĉiuj,
-ciu unuopulo- devas kushaliti. Ĉu vi, ĝuste vi ne povas gastigi
junul(in)ojn, kiuj volas vojaĝi? Se ne, ĉu vi, ĉu la
gepatrojn, viajn onklojn kaj onklinojn, viajn gekonatojn.
Certe iu -au ec pluraj- estas preta logigi junan esperantist(in)
on dum kelkaj tagoj au semajnoj por kiom eble plej malalta
prezo. Petu viajn gekonatojn vi samidean(in)o, petu ilin firme,
ke ili akceptu eventualan gaston (eble ili tion faros ec sen-
page!) kaj poste skribu tuj al la Vojaĝservo la adresojn de
la personoj, kiuj pretas akcepti-iajn gastojn, skribu, kiom da
personoj povas veni, kiom longe ili povos resti, ĉu povos veni
gejunuloj au nur fraul(in)oj, kaj ĉu la gastoj nepre havu ian
religion.

Kaj se vi mem volas vojaĝi, skribu, kiun landon vi deziras viziti, kiu(j)n urbo(j)n kaj indiku la tempon, dum kiu vi deziras restadi. Skribu ankaŭ tion, ĉu vi nepre bezonas senkoston ejon, aŭ ĉu vi eventuale povos pagi por ne tre multekosta hotelo, junulargastejo aŭ naturamika domo.

Al ĉiu letero nepre ĉemetu internacian respondkuponon, se vi deziras respondon kaj ĉiam skribu sufiĉe frue, alie ni ne povos garantii la ĝustatempan prizorgon.

Ni klopodos plenumi ĉiujn viajn dezirojn tute senkoste, kondiĉe, ke vi estas ano de TEJO.

Ĉu vi ankoraŭ ne estas ano de TEJO, vi nur volas veturi, ĉar vi legas regule LJV-n? Ne grave! Anoncu vin por fariĝi membro kaj ankaŭ vi profitos.

Se en via urbo aperas (os) esperantlingvaj prospektoj, bonvolu sendi kelkajn ekzemplerojn al mi.

Nun karaj geamikoj, varbu diligente kaj estu kore salutata de via

Reiter Heinrich,
TEJO-Vojaĝservo,
SALZBURG I. 557.
Austrujo.

P.S. Ne petu senpagajn tranoktejojn en l'Aquilla, ĉar tion ni nepre ne povos garantii!

Financa superrigardo pri la IJK en Hilversum.

Enspezoj:

Elspezoj:

kolekto antaŭ la komenc-
igo de la kongresa pre-
parado+ kongresenpagoj 4282.49
gajno de dukongresa
L.S. 8.67

luo de b konstruoj 262.50
eksk.al Madurodam 453.--
" Amsterdam 111.30
manĝaĵo kaj servado 2864.81
luo de litaĵoj k.s. 120.80
Bunta vespero 288.17
afranko, presaĵoj+
propagando 175.90
Por "Ons Gebouw" 91.20
div.malgrandaj elsp. 27.03

defizito 103.55

kune ned.guld.4394.71

kune ned. guldenoj 4394.71

La monafero de la germanaj partoprenintoj ankoraŭ ne estas en ordo, do kiam ni estos ricevintaj la kongreskotizojn, ne plu estos deficito, sed eĉ certa profito.

Ĉu amiko Brune, la eksperanto por Germanujo bonvolos sendi kiel eble plej baldaŭ la monon al Nederlando? Tio eblas per internacia poŝtmandato. Ĉu sro Brune bonvolos kontakti ankaŭ kun la nova peranto Sro Kiessling, Hildesheim, Sachsenring 16. por solvi la TEJO-aferojn por Germanujo? TEJO urĝe bezonas sian monon.

Akceptu ambaŭ la dankon de ĉiuj TEJO-anoj.

El "La leteroj de Dro Zamenhof":

....ju pli oni kritikos,...des pli kontenta mi estos; mi deziras nur, ke la kritikado ne estu negativa, sed pozitiva, t.e. ke la kritikantoj ne limigu sin per simpla sencela mallaudado, sed ke anstataŭ ĉio malbona ili proponu ion pli bonan, precizan kaj facile akcepteblan.....

Geamikoj petas nian helpon!

Ankorau neniam havis TEJO tian malagrablan financon situacion, kian nun kaj ancorau oni neniam petis tiom da senpagaj nroj, kiom nun.

Kiel ajn volonte ni plenumus la petojn -nia celo estas ja disvastigi la amikajn sentojn inter la junularo-, bedaurinde nia preskau malplena kaso ne permesas tion.

Ni nur tiam povas sendi senpagajn nrojn, se estas geamikoj, kiuj pretas aboni, au sendi sia(j)n jam legita(j)n ekzemplero(j)n (p r e f e r e a b o n i , mi petas!) al iu el la petintoj. Jen kelkaj adresoj:

Sro Ĥristo Dimitrov,
Gorica-Popovsko, Bulgarujo.

Sro Hieronymus Stroinski,
Borsdorf ĉe Leipzig,
Koloniestr.10.
Germanujo.

V. Raymond Winter (15jara)
30 Courtland Avenue,
Ilford, Essex, (dez.kor.pri linoj kaj muziko)
Anglujo.

Vágó Imre, instruisto,
Pécs, Rudas László utca 21.
Hungarujo. (Liaj gelern. 11-13 jaraj dez. kor.)

Hermod Moursund (11jara)
Fjordgard, Norvegujo. (Filatelisto,dez.kor.kun la tuta mondo)

Niedzielski Zbigniew,
Nagłowice, pow.Jedrzejow, woj. Kielce, Pollando.
Li volonte rekompencas por la abono per la belaj polaj revuoj, ekz. "Turysta" (turisto), il.monata gazeto, "Fotografia" (fotografajo) "Sportowiec" (sportulo) ilustr. dusem. gaz. ktp.

Ing. Leszek Dobrowolski, (25jara)
Złotoryja,
ul. H. Pobożnego 17c/m2
woj. Wroclawskie, Pollando. (dez.kor. Certe resp.)

Krome estas multaj aliaj petoj de gejunuloj, kies adresojn ni provizore pro cirkonstancoj prefere ne sciigas.

Geamikoj ankaŭ al ni plaĉus, se ni estus en simila kazo helpataj, helpu do ankaŭ ni.

ESPERANTO UZOTA EN GRAVA INTERNACIA EKSPozICIO!!

o=o

La Australia Asocio de Model-Societoj aranĝos dum Aug.-Sept.1955. sian 5an grandan Internacian Foiiron de Modeloj en Melbourne. Ĝi okazos en la plej granda ekspoziciejo de la suda duonsfero kaj oni atendos proks. 250,000 vizitantojn. La organizantoj disponigos al la Australia E-Asocio senkoste grandan standon, kie oni montros modelojn ensenditajn de E-istoj tutmondaj.

La prezidanto de A.A.M.S. sro L. Elliot ĝuste vizitas Eŭropon kaj ankaŭ kontaktos kun E-kluboj kaj delegitoj por peti ilian kunlaboron. Jen unika okazo por montri la gravan rolon de universala lingvo, ĉar ni esperas ricevi multajn modelojn pere de la tutmonda E-movado.

La organizantoj serĉas bonajn modelojn de ŝipoj, vagonaroj, automobiloj, motorboatoj, aeroplanoj kaj aliajn modelojn, kiuj re-speguligas naciajn karakterojn. Ĉar nur malmultaj model-konstruantoj estas samtempe ankaŭ E-istoj, ni petas, ke lokaj samideanoj kontaktu kun lokaj model-konstruantoj kaj informu ilin pri la ekspozicio. Modelojn kun priskriboj (en Esperanto) oni sendu ĝis la 15a de julio al: AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO, Box 2122 T. Elizabeth St. MELBOURNE, Aŭstralio.

Ordinara marpoŝto daŭras al Aŭstralio 8-10 semajnojn. La organizantoj pagos la koston por resendi la modelojn post la ekspozicio.

Ni estas certaj, ke ĉiu E. organizo povos helpi kontakti modelkonstruantojn kaj tiamaniere pruvi, ke Esperanto povas ludi gravan rolon en internaciaj aferoj. Nur tre malofte ni havas eblecon partopreni en tiel granda entrepreno (30 nacioj partoprenos).

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

H. Koppel, sekr.

Aŭstralia Asocio de Model-Societoj:

Stan Milligan,

Esperanto Fakestro.

ORGANIZAJ INFORMOJ

Francujo: Por reordigi la adresliston niaj francaj anoj estas petataj kiel eble plej baldaŭ pagi al nia perantino la jaran kotizon (300 fr.)

Mme Lilli Giloteaux-Topor von Waldowski,

28. rue des Jardins,

CROIX (Nord),

C.C.P. Lille 1061.46

Krom LJV-n la aktivaj anoj ricevos -laŭbezzone presitan informilon.

Germanujo: Ĉiuj membroj bonvolu sin tuj anonci ĉe la nova peranto

Gerhard Kiessling,

HILDESHEIM, Sachsenring 16, 2 Tr.

por ordigi la kotizaferon.

Artikolojn ktp. el gazetoj kaj revuoj esperant- kaj naci-lingvaj pri TEJO kaj Esperantista junularo sendu regule al la gvidanto de Gazetar-kaj Dokumentservo de TEJO:

Felmut Lehmann,

BERLIN-NEUKÖLLN, Bornsdorferstr. 27.

Jam nun pripensu, ke dum la Paskotagoj de 1955. denove okazos en Berlino "INTERZONA RENKONTIĜO" aranĝota de la EJB en kunlaboro kun la GEB-estraro. Multaj sevetzonaj kdoj jam nun promesis sian partoprenon. - Kiu ne povas la interzonan renkontiĝon ĉeesti, sendu salutleteron.

KORESPONDADRESOJ

Francujo: 40 gekursanoj (17-30j) dez. kor. kun la tuta mondo. Let. vesp. okazos komence de Februaro 1955a. Al ĉiu let. aŭ p.k. el ekstereuropa lando ni respondos ĝis pasko 1955. ESPERANTO-TEJO-SEKCIO, 36 Cours Leopold, NANCY.

Germanujo: 12jara f-ino Köhne (20b) Göttingen, Burgstr. 11. lern. de supera lernejo, dez. kor. kun knabinoj el Anglujo, Francujo, Svedujo.

ANKAŬ LA HELPEPANTOJ DEZIRAS KORESPONDI KUN DIVERSAJ LANDOJ. ILIAN ADRESON VI TROVOS SUR LA ANTAŬA PAĜO.

LA KORESPONDADO PLIVIGLIGAS VIAN ESPERANTON, KAJ PLIFORTIGAS LA AMIKAJN SENTOJN INTER LA HOMARO DE LA GRANDA MONDO.